Esperanto Societo Frankfurto

Majo 2023

ESPERANTO-INFORMILO

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Esperantujo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Foto: A. Deutsch, Impresoj de la pasinta somero , Lago de Garda (Italio)

La maja eldono de la Esperanto-Informilo aperas kunredaktita de Georgo (GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: Ulrich Fellmann

Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main
www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender: Georg Hennemann
georg.hennemann@t-online.de
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende	Klub-vesperoj
Dienstag, d. 2. Mai 23	**mardon, la 2-an de maj. 23**
19:00 h per Zoom	**19:00 h per Zoom**
Offene Sprachrunde	**Malferma babila rondo**
Dienstag, d. 9. Mai 23	**mardon, la 9-an de maj. 23**
19:00 h per Zoom	**19:00 h per Zoom**
Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)	**Fermita babila rondo (nur klubanoj)**

Zoom-Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 16. Mai 23	**mardon, la 16-an de maj. 23**
18:30 h surloke	
18:30 h **Sprachrunde:** A. Stecay	**18:30 h** **Babila Rondo**: A. Stecay
19:30 h **Vortrag:** B. Westerhoff „Über das diesjährige 50. Jubiläum der *Bahá'í Esperanto-Liga (BEL) und das aus diesem* Anlass publizierte Buch *‚Gott geht vorüber'* "	**19:30 h** **Prelego:** B. Westerhoff „Pri la ĉi-jara 50a jubileo de la fondo de la Bahaa Esperanto-Ligo kaj pri la ĵus okaze de ĝi eldonita la libro *‚Dio preterpaŝas'*"

mardon, la 23-an de maj,23

ekde la 19h horo: **Senprograma samideana babila renkontiĝo**
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Naskiĝtagoj

En majo festos sian naskiĝtagon:

27.05 Manfred Sailer
29.05. Gerd Schubert

Ni kore gratulas!

Detajloj pri la du someraj ESF-eventoj:

- **Sabado, 08.07.23** ESF ekskursas al urbo Offenbach.

  Ni renkontiĝas **12:00** tagmeze en **restaŭracio Stern**, Wilhelmsplatz 7 , 63065 Offenbach am Main.
  Post tagmanĝo je la 13:30 horo ni kune iros aŭ veturos al la fama **Ledomuzeo** kie atendas nin interesa ganto-ekspozicio. La ekskurso finiĝas ĉe Cafe-Bar-Restaurant **Försters** en Goethestraße 59,
  kie tabloj estas rezervitaj ekde 16:00 ĝis 18:00.
  Ligiloj:
  http://www.brasserie-offenbach.de/karten/zumStern/Speisekarte_Stern.pdf
  https://www.ledermuseum.de/besuch
  https://cafe-foersters.de/speisen-und-getraenke/

- **Sabado, 19.08.23** ESF-somerfesto en Langenhain ĉe la nacia bahaa centro de Germanio.

  Ni kore invitas al la ESF-somerfesto, kiu ĉi-jare estas organizita de nia klubmembro
  Bernhard Westerhoff el Hofheim-Langenhain. La evento okazas ĉe la nacia bahaa centro de Germanio resp. en la ombro de la ĝis nun sola bahaa templo de Eŭropo, kie eblas uzi la ekipaĵojn de la tiea akceptejo por vizitantoj kun ekspozicio kaj librejo ktp.

  Ni esperas je bona vetero kaj sidos ekstere – alikaze sub granda tendo.

  La adreso estas: **Eppsteiner Straße 95 en 65719 Hofheim–Langenhain**.
  La somerfesto komenciĝas precize je la **13-a** posttagmeze kaj finiĝas cirkaŭ la **17-a** vespere.
  Kiel kutime ĉiu bonvolu kunporti laŭplaĉe iom da manĝaĵo kiel kukon, salaton kaj kolbasojn
  por la kradrostado. Bernhard provizos trinkaĵojn.

Esperanto kaj Etereumo - similaj vojoj kaj obstakloj ?

Opinia eseo de Georg Hennemann

Esperanto kaj Etereumo - similaj vojoj kaj obstakloj ?
Simile kiel ekzistas pli ol mil diversaj planlingvaj projektoj, jam hodiaŭ ankaŭ ekzistas kvazaŭ samnombraj diversaj bitmonaj projektoj - apud la plej konata bitmonero nomata "Bitcoin" la bitmono Etereumo (angle: “Ethereum”) estas unu el la pli konataj.
Esperanto estas projekto kun la celo ke homoj lernu facilan lingvon kaj pli bone kompreniĝu unu la alian. Tiu praktike eblas ĉar Esperanto estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj. Kaj Esperanto havas la avantaĝon ke ĝi estas relative neŭtrala, tiu signifas, ke ĝi estas propraĵo de neniu ajn ŝtato aŭ lando. Tiu neŭtraleco kaj la malferma aspekto de la lingvo faras el ĝi la idealan kandidaton por la venonta mondlingvo. En tiu senco la nuntempa disvastiĝo de la angla lingvo estas ja bonega komenco, ĉar ĝi metas la bazon al pli justa mondlingvo.
Mi nuntempe kun interese legas pri la rapida evoluo kaj disvastiĝo de diversaj bitmonaj valutoj. Eble interesus vin ke ankaŭ Bitmono povas estis nomita neŭtrala, ĉar neniu ŝtato au lando povas kontroli au eĉ malpermesi bitmonerojn. Kaj ni bezonas ja pli justan financan sistemon: Hodiaŭ, miliardoj da homoj ne povas malfermi bankkontojn, aliaj havas siajn pagojn blokitaj. La sistemo de malcentralizita financo (angle: DeFi) de Etereumo neniam dormas aŭ diskriminacias. Kun nur interreta konekto, vi povas sendi, ricevi, prunti, gajni interezojn kaj eĉ trasendi financojn ie ajn en la mondo.

Bitmonaj projektoj same kiel planlingvaj projektoj estas iasence nekontrolebla - kaj tiu ofertas ŝancojn sed ankaŭ riskojn. Kiam la homoj ekscias pri la novaj ŝancoj kaj eblecoj kiun bitmono kaj precipe la t.n. "inteligentaj aŭ spertaj kontraktoj" (angle: "smart contracts") ilin povas oferti, ili nature ne volas malhavi tiun progreson. Fakte per spertaj kontraktoj homoj iĝos de nuraj konsumentoj al kaj konsumentoj kaj producentoj de informoj. En la angla oni kreis la novan vorton prosumer[1] "prosumento" por tiu nova stato, kiu kunigas konsumenton kaj producenton en unu persono. Do en la proksima futuro ni tre verŝajne ricevos bitmonon, kiam firmaoj volas havi niajn datumojn aŭ niajn opiniojn. Interese estas ke Etereumo, apud Bitcoin la dua plej konata bitmona valuto, estis precipe evoluita por ke spertaj kontraktoj povas uzi la blokĉenon de Etereumo, kaj nun multaj programistoj komencas lerni tiujn novajn konceptojn kaj teknikojn kaj plievoluas ilin. La tielnomata evoluiĝanta interretejo “3.0” ne postulas iun "permeson", kio signifas, ke centraj aŭtoritatoj ne povas decidi kiu ricevas aliron al kiuj servoj, nek ĝi postulas "fidon", kio signifas, ke peranto ne estas necesa por virtualaj transakcioj okazanta inter du aŭ pli da partioj. Ĉar ĉi tiuj agentejoj kaj perantoj faras la plej grandan parton de la datumkolektado, Interretejo 3.0 teknike protektas la privatecon de la uzanto pli bone.

[1] vidu https://en.wikipedia.org/wiki/Prosumer
[2] https://eo.wikipedia.org/wiki/Ethereum

Tiun temon ankaŭ pritraktas novpublikita libro „Bitmono kaj Esperanto“ de Daniel Acosta el Venezuelo:
https://libroj.org/book/11130/s/bitcoin-kaj-esperanto#reviews
Vidu ankau:
https://www.coindesk.com/can-bitcoin-learn-failure-global-language-esperanto
https://cointelegraph.com/learn/what-is-web-3-0-a-beginners-guide-to-the-decentralized-internet-of-the-future

Praktika ekzemplo pri AI - artefarita inteligento

de Fritz-Ferdinand L. Palatinus (TF)

Praktika ekzemplo pri AI – artefarita inteligento
Pro scivolemo mi iomete okupiĝis pri la praktikaj metodoj de la t.n. artefarita inteligento AI, kiu laŭ mia opinio vere estas nova ŝtupo de evoluiĝo de la komputilaj aplikaĵoj. Se mi bone komprenas, AI bezonas gradegan stokon de traserĉendaj kaj kombinendaj informoj (angle: big data) por entute funkcii senchave, kaj mi miras pri la rapideco, kun kiu

la programo tamen sukcesas verki esojn kian la sube prezentitan ene de malmultaj sekundoj. La potencoj de la elektronikaj datumprocezado fariĝas pli kaj pli mistikaj por mi.

La enreta programo, per kiu mi iniciatis la eseon, estas "essaygenius.ai". Vi simple skribu titolon en la skribfenestreton kaj startu la programon. Atentu kelkan tempon kaj vi ricevas eseon. La titolo prefere estas angla, sed la programo funkcias ankaŭ je la germana lingvo. Tamen la rezulto ĉiam estas angla. Mirinde por mi estis konstati, ke la lingvaĵo estas je sufiĉe alta nivelo. Tial mi supozas, ke miaj konoj de la angla lingvo ne estas tute adekvata por liveri akcepteblan tradukon. Tial mi ankaŭ prezentas la originalan anglan tekston.

Multan plezuron deziras Fritz-Ferdinand L. Palatinus

High Energy Pylons As Cultural Landscape Assets

Introduction:

High Energy Pylons, also known as transmission towers or electricity pylons, have long been viewed as eyesores and obstacles to local landscapes. However, in recent years, some have argued that they should be seen as cultural landscape assets, rather than simply functional infrastructure. This essay will explore the various arguments both for and against this notion, assessing the cultural and economic benefits and drawbacks of utilizing pylons in this way.

The Pros of High Energy Pylons as Cultural Landscape Assets:

One of the primary benefits of embracing high energy pylons as cultural landscape assets is the unique visual appeal that they can bring to an area. High energy pylons, with their unique shapes and profiles, can create a distinctive and memorable visual impression on viewers. This is particularly true when pylons are placed in striking or unexpected locations, such as prominent hilltops or along scenic routes.

Another pro of using high energy pylons as cultural landscape assets is the potential economic benefit they can bring to an area. By incorporating high energy pylons into a broader cultural landscape plan, local governments and businesses can attract increased tourism, generating revenue for local communities. Pylons can also attract footfall from potential commercial interests and investors, who appreciate the forward thinking of incorporating such infrastructure in a way that creates a sense of place and identity.

Finally, proponents of high energy pylons as cultural landscape assets argue that these structures can play an important role in addressing larger environmental concerns. By incorporating renewable energy sources such as solar or

Elektroturoj je alta tensio kiel pejzaĵaj kulturvaloraĵoj

Enkonduko:

Elektroturoj je alta tensio (plue: AT-turoj, la trad.), ankaŭ konataj kiel transsendaj pilonoj por elektro, longe estis konsiderataj kiel okulvundigaj kaj kiel fuŝaĵoj por lokaj pejzaĝoj. Dum la lastaj jaroj tamen, kelkaj homoj argumentas, ke tiujn oni alrigardu kiel pejzaĵajn kulturvaloraĵojn, anstataŭ nur kiel simplan porfunkcian infrastrukturon. Tiu ĉi eseo volas esplori la diversajn argumentojn por'ajn kaj kontraŭ'ajn por tiu nocio, taksante tiel la kulturajn kaj ekonomiajn bonaĵojn kaj maltaŭgaĵojn de tiel trakti AT-turojn.

La por'oj de AT-turoj kiel pejzaĵaj kulturvaloraĵoj:

Unu el la unuarangaj bonaĵoj por aplaŭdi AT-turojn kiel pejzaĵajn kulturvaloraĵojn estas la unika optika impulso, kiun ili povas doni al tereno. Elektroturoj per siaj unikaj siluetoj kaj profiloj povas krei distingan kaj rememorigan optikan impreson al rigardantoj. Tio estas aparte la kazo, se la turoj estas metitaj en okulfrapaj aŭ neatenditaj lokoj kiel ekz. elstaraj montetopintoj aŭ laŭ belscenaj vojoj.

Alia pro'o por rigardi AT-turojn kiel pejzaĵajn kulturvaloraĵon estas la ebla ekonomika utilo, kion ili povas porti al regiono. Per enigi elektroturojn en pli vastan planon de kulturaj pejzaĝoj, lokaj administroj kaj komercoj povas allogi kreskantan turismon, generante renditon por lokaj komunoj. Elektroturoj ankaŭ povas allogi potencialajn komercajn interesatojn kaj investorojn, kiuj alte estimas la ontecan vizion de integrigi tiamanieran infrastrukturon tiel, ke ĝi kreos senton de loka hejmeco kaj identeco.

Fine, pledantoj por AT-turoj kiel pejzaĵajn kulturvaloraĵon argumentas, ke tiaj strukturoj povas ludi gravan rolon, se temas pri pli ampleksaj naturprotektaj koncernoj. Per inkludi fontojn de renoviĝantaj energioj kiel ekzemple suna aŭ venta

wind energy, high energy pylons can create a more sustainable energy infrastructure while maintaining the visual beauty of a landscape.

The Cons of High Energy Pylons as Cultural Landscape Assets:

However, there are also potential drawbacks to using high energy pylons as cultural landscape assets. One of the primary arguments against this approach is that it can lead to the commercialization of previously undeveloped or natural landscapes. High energy pylons, when incorporated into a broader cultural landscape, can detract from the natural beauty or cultural value of an area. For example, solar or wind energy pylons may have a negative impact on established natural habitats or traditional landscapes, especially if design guidelines are not adequately communicated across the stakeholders of the land.

Another potential issue is that incorporating high energy pylons into a cultural landscape can be expensive, requiring substantial investment of time, money, and resources. This can lead to tensions between the

energion, elektroturoj povas kunkrei pli findindan energian infrastrukturon dum konservi la optikan belecon de pejzaĝo.

La kontraŭ'oj de AT-turoj kiel pejzaĵaj kulturvaloraĵo:

Aliflanke ekzistas ankaŭ potencialaj malavantaĝoj en la utiligo de AT-turoj kiel pejzaĵaj kulturvaloraĵo. Unu el la plej gravaj argumentoj kontraŭ tiu starpunkto estas, ke ĝi povas kaŭzi komercan ekspluaton de ĝis nun nur rare evoluiĝintaj aŭ tutnaturaj pejzaĝoj. Elektroturoj, inkluditaj en larĝajn kulturajn pejzaĝojn, povas malfokusigi de la natura beleco aŭ kultura valoro de regiono. Per ekzemplo, elektroturoj je suna aŭ venta energio povus havi negativan influegon al bone establitaj naturaj habitatoj aŭ tradiciaj pejzaĝoj, aparte se la principoj de la pejzaĵa formado ne estas adekvate komunigitaj per la eluzantoj de la arealoj.

Alia ebla obstaklo estas, ke enigi energiturojn en kulturan pejzaĝon povas esti multekosta, tiel postulante neneglekteblan investon de tempo, mono kaj resursoj. Tio povas kaŭzi misharmonion inter la loka komunumo kaj la

local community, commercial interests, and regulatory agencies, who may have varying ideas of their ideal vision for the future of the land. A carefully coordinated approach that actively engages local communities, stakeholders and the wider public can help to address these potential conflicts and maximise the benefits of utilizing pylons as cultural landscape assets.

Conclusion:

In conclusion, the debate around using high energy pylons as cultural landscape assets is nuanced and multifaceted. While there are clear benefits, including attracting tourists, generating revenue, and reducing environmental impact, there are also potential drawbacks, such as disrupting natural habitats or traditional landscapes, and the financial resources needed. Overall, a carefully balanced approach is required to take full advantage of the possibilities of high energy pylons in a cultural landscape, maintaining the natural beauty of the landscape while also meeting economic and environmental imperatives

reguligaj instancoj, kiuj povas havi malsamajn ideojn pri la ideala vizio por la onto de la lando. Zorge koordinata evoluprocezo, kiu aktive enplektas lokajn komunumojn, eluzantojn kaj la ĝeneralan publikon povas helpi temigi tiajn eblajn konfliktojn kaj plejgrandigi la utilojn de la uzado de AT-turoj kiel pejzaĵajn kulturvaloraĵojn.

Resumo:

Resume, la debato pri la uzado de elektroturoj je alta tensio kiel pejzaĵaj kulturvaloraĵoj estas nuancriĉa kaj multfaceta. Dum unuflanke klare ekzistas profitoj, inklude de allogi turistojn, de krei renditojn kaj de malgrandi naturmediajn damaĝojn, aliflanke ekzistas eblaj malbonaĵoj kiaj rompi naturajn habitatojn aŭ tradiciajn kulturpejzaĝojn, same kiel la amplekso de necesaj financaj rimedoj. Entute estas necese atenta diskutado je ambaŭ flankoj, por povi utiligi ĉiujn potencialojn de tiaj AT-turoj kiel pejzaĵaj kulturvaloraĵoj, samtempe konservante la naturajn belecojn de pejzaĝoj kaj adaptiĝante al la ekonomiaj kaj naturprotektaj defioj.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Instruisto de historio: - Tuj, kiam la batalo en la arbaro de Tojtoburgo finiĝis, Arminio la keruskano ekbruligis cigaredon. Kion vi opinias pri tio?
Lernanto: - Tio ne eblas.
Instruisto: - Bonege. Kial ne?
Lernanto: - Ĉar la fumado estas malpermesita en la arbaro.

Proverbo de la monato

La proverbo, kiun mi ĉifoje prezentas estas: „Demeti de si la antikvan Adamon"
El: https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/a/a2/EO_L._L._Zamenhof_-_Proverbaro_Esperanta_1910.pdf

Sed kion signifas tiu proverbo? Ĝi rilatas al la kristana kutimo de akvobapto kaj signifas, ke "la maljuna Adamo en ni, per ĉiutaga pento kaj pentofarado, estos dronita kaj mortos kun ĉiuj pekoj kaj malbonaj voluptoj; kaj denove ĉiutage eliru kaj leviĝu nova homo, kiu vivas en justeco kaj pureco antaŭ Dio eterne." Por pliaj klarigoj vizitu: https://www.ekd.de/Kleine-Katechismus-Vierte-Hauptstueck-13472.htm
Ĉu ankoraŭ aktuala proverbo? Komentoj aŭ replikoj estas bonvena!

Enigmo(j) (sendita de Ulriko)

Enigmo el la lastaj ei-oj:
En la marta eldono de la ei mi ja prezentis vortliston kaj demandis, kiu sola vorto ne apartenas al la aliaj listitaj vortoj. Ĉar ĝis nun neniu sendis solvon, mi donu faciligan indikon por doni plian ŝancon solvi la enigmon. Mia konsilo estas kontroli ĉiun vorton en la Fundamento :-)

aerumi, agaco, akvomelono, baldakeno, barĉo, biero, bismuto, dando, eksplodi, Elizabeto, konscienco, lavango, lekcio, Ludovik', prujno, reprezenti, rezultato, Sofio, sofismo, vaflo?

Nova enigmo:
Sinonimoj, homonimoj, nuancoj kaj ofte konfuzitaj vortoj (de Ulriko Felmano)
Sub tiu titolo okazis nia lingva rondo dum la lastmonata prelegokunveno. Ĉar la temo ŝajnas sufiĉe interesa, mi prezentas ĉi-tie la taskon de tiu vespero al ĉiuj de vi, kiuj ne povis partopreni, kaj al la partoprenintoj por recerbumi.
La tasko esti: kio estas la diferenco - se estas io - inter la sekvaj vortserioj?

gajni - venki
varbi - reklami
suno - stelo
luno - trabanto
fi - aĉ
iri – piediri - promeni - migri
babili - interparoli - konversacii
diri - informi - anonci
inteligenta - saĝa
koloro - farbo
efiko - efekto
proceso - procezo - procedo - proceduro

vorto - vortformo - signifo - nocio
signo - litero - skribsigno - simbolo - hanzio
akcidento - kraŝo - kunpuŝiĝo - kunpuŝo
kunveno - renkonto - renkontiĝo - mitingo
demonstracio - manifestacio
opinii - kredi
voli - intenci

Kaj provu solvi la jenan enigmon: klarigi, kio estas la diferenco inter
ruso - rusiano - rusujano, Iro - irlandano.

Lasta paĝo

La decido (de Ulriko Felmano)

La decido

Ili mistraktis unu la alian ĝis
Ŝi serĉis la grandan tranĉilon
Kiun ŝi tiom ofte uzis por la viando
Ĉar tiu fia mistrakto ne povis daŭri
Jen la bontranĉa akra tranĉilego
Ĝi sentiĝas varme, forte, kaj silentige
Ŝi plikalmiĝis

Aaaaaaaaa...
Vi terurigis min! Mi ne vin atendis!
Pardonu, mi hodiaŭ pli fruas... ĉefo diris ke ni jam povas hejmiri... kion vi faras?
Mi faras buĉpledon... nia iama ŝatmanĝo... por havi pacigan paroladon... ne daŭru tiel...
Vi pravas, sed tia manĝaĵo tre eksmodiĝis...
Jes, multaj aferoj tre ŝanĝiĝis... ...ekde kiam ni enamiĝis.
Jes. Kaj do...
Mi volis krei taŭgan etoson...
Memorigi pri nia komenca tempo...
Nia amo. Mi ankoraŭ havas ĝin...
Profunde kaŝite... Superŝutite de ĉiutagaĵoj...
Donu la tranĉilon al mi!
Kial...
Mi volas vin subteni kaj helpi kuiri.

Kiam ili poste bonetose manĝis, ili multe babilis kaj ridis.
Mi tre ŝatas, ke vi hodiaŭ pli frue venis. Kaj tiom afable reagis...
Jes, ankaŭ mi ŝatis, ke vi havis tiun bonan planon kaj pozitivan sintenon...
La planon... mi iomete ŝanĝis. Ĉar vi helpis.
Ĉu vi volis kuiri ion alian?
Nu, ne plu gravas. Estas bone, kiel estas. Ni tamen ne refalu al niaj antaŭaj malbonaj kutimoj...
Vi pravas. Tio nepre evitendas.
Mi tre ŝatas tiun akran novan saŭcon, kiun vi faris. Ni antaŭe neniam havis ĝin!
Jes, estas nova recepto. Mi havis certan ideon pri ĝi, sed nun iomete ŝanĝis la recepton. Ankaŭ al mi ĝi tre bongustas!

--